


## Verve pri verboj

Verboj tre gravas en ĉiu lingvo. La frazo estas la baza komunika unuo, kaj la verbo estas la motoro de la frazo. Aliaj fraz-elementoj dependas (kaj de-pendas) de la verbo aŭ verboj en la frazo. Verboj aparte gravas en Esperanto, ĉar ili bezonas zorgan instruadon. Ne temas pri la verbo-tempoj, kiuj estas unike facilaj kompare kun naciaj lingvoj. Temas pri la transitiveco aŭ ne-transitiveco de la verboj. Tio pli malfacilas en Esperanto ol en multaj naciaj lingvoj. Preskaŭ senescepte, Esperantaj verboj havas difinitan transitivo-staton. Kiam oni instruas aŭ lernas verbon, estas esence, ke oni samtempe lern(ig)u ties kategorion. Lerniloj kaj lernigantoj devas prezentadi verbojn en siaj minimumaj kuntekstoĵ: Manĝas –ON, vidas –ON, komencas –ON, sed okazas –O, mankas –O k.s. Nur tiel, oni povas esperi je sukcesa rego de la akuzativo por montri rektajn objektojn, kaj de la sufiksoj IG kaj IĜ.

Kiel prezenti tion la lernantoj en Esperanto, en memorebla formo, precipe al lernantoj kiuj ne havas firman gramatikan konon, eĉ de sia gepatra lingvo? Jen propono:


**Netransitiva verbo bezonas unu ligan por funkcii.**

### UNU-LIGA VERBO



**Transitiva verbo bezonas du ligojn por funkcii.**

### DU-LIGA VERBO



### Vortordo:

Prezente la supran skemon, evitu skribi la subjekton nepre antaŭ la verbo. Ni devas emfazi ke vort-ordo estas libera en Esperanto. La akuzativa finaĵo estas regata, ne de la pozicio de la rekta objekto en la frazo, sed de la kategorio de la verbo. Kun du-ligaj verboj, la vortordo estas plej ofte SUBJEKTO-VERBO-OBJEKTO. Sed kun multaj unu-ligaj verboj, la vortordo vere estas libera: *Akcidento okazas / Okazas akcidento; Aperas kuniklo / Kuniklo aperas; Mankas mono / Mono mankas; Venas trajno / Trajno venas ...*

### Verboj de egaleco:

La verboj 'estas', 'restas', 'ekzistas' kaj kelkaj pliaj falas iel ekster tiu skemo, ĉar ili ne prezentas agon, sed esprimas nur egalecon aŭ ekzistadon. Verboj kiel 'ekzistas' estas trakteblaj kiel unu-ligaj verboj: *Ekzistas mon-krizo; monkrizo ekzistas*. La verboj 'estas' kaj 'restas' bezonas apartan atenton, ĉar ili ja ofte aperas en du-ligaj kuntekstoĵ: *Rozo estas floro, La vetero estas bela, Oni restas senlabora*. Ne temas pri ago transiranta de unu aĵo al alia, sed esprimo de egaleco aŭ aparteno al kategorio. Sekve la baza verbo 'estas' ne bezonas akuzativon.

### Absolutaj uzoj:

Multaj verboj povas aspekti kvazaŭ ili estus unu-ligaj, ekzemple "Ni manĝos je la oka". Je la oka ni ja manĝos ion, sed la esprimado de la rekta objekto en tiu komunika momento ne estas bezonata. Similaj kazoj estas: *Ni ludas. Mi grimpas. Mi helpas. Mi timas. Ni komencu!* k.m.a. Tio estas absoluta uzo de du-liga verbo. Por bone pluformi tiajn verbojn, oni devas

tamen klasi ilin du-ligaj (transitivaj). La regulo estu: Se la verbo povas akcepti rektan objekton, ĝi estas du-liga.

### *Esprimo de ago per akuzativo aŭ prepozicio*

Pluraj du-ligaj verboj prezentas nociojn, kiujn oni povas egale bone prezenti per uzo de rekta objekto (t.e. akuzativo) aŭ per prepozicio, tiel ke akuzativo ne estu uzata: Mi helpos vin / Mi helpos al vi. Mi klarigos tion / Mi klarigos pri tio. Mi timas tion / Mi timas pri aŭ pro tio. Mi suferas doloron / Mi suferas je doloro (aŭ pro doloro). Aliaj transitivaj verboj ne kondukas tiel, kaj la dua ligo praktike estas esprimebla nur per akuzativo: Ekz: La prezidanto batas la tablon.

Parenca kazo estas la eblo enpreni prepozicion en la verbon, tiel ke vi formu transitivan verbon el netransitiva: Mi zorgos pri tio → Mi prizorgos tion. Mi iros al la urbo / Mi aliros la urbon. Atentu, ke tia enkonstruado de la prepozicio ne ĉiam rezultas en la kreo de transitive verbo: Mi venas al la urbo. Mi alvenas al la urbo. Mi iras for. Mi foriras.

Implico de tiuj kazoj, ke en la lernado de verboj, gravas ne nur scii la transitivecon, sed ankaŭ scii la prepoziciojn, kiuj estas tipe ligitaj kun la verbo: Helpi al iu, Bezono je io, Timi pri io, Gravas eviti la influon de la nacia lingvo tiurilate, ekz. Mi pensos al tio\* (ĝermanlingvanoj, prefere 'pri'), Mi studas sur la universitato\* (hungaroj, prefere 'en'), Ni suriros la trajnon\* (anglaparolantoj, prefere 'en'), aspirino por kapdoloro (anglaparolantoj, prefere 'kontraŭ').

### *Atentindaj verboj*

#### *Netransitivaj:*

Mankas –o  
Aperas –o  
Necesas –o  
Okazas –o  
Haltas –o  
Ordas –o  
Varias –o  
Plaĉas –o al iu

Evoluas –o  
Imponas –o (per)  
Omaĝas –o (al io)  
Kondutas iu iel  
Pendias –o  
Rezultas –o

#### *Transitivaj:*

Komenci –on  
Ŝanĝi –on  
Bezoni –on  
Timi –on  
Havi –on  
Movi –on  
Emocii –iun  
Impresi –iun  
Ordoni –on  
Orienti –on  
Veneni –on

Trui –on  
Loki –on (sed situas –o)  
Diplomi –on  
interesi –on  
Ruli –on (sed glitas –o)  
Fleksi –on  
Kolonii –on  
Kultivi/Kulturi –on  
Nuansi –on  
Rimi –on

Pliaj sugestoj bonvenaj. Dankon al Rob Moerbeek (NL) pro livero de listo de verboj ĉe kiuj multaj parolantoj stumblas, ili troviĝas fine de ĉi tiu listigo.

### *Superrigardo de IĜ kaj IG*

La sekvaj du paĝoj proponas al vi skemon per kiu superrigardi la uzon de tiuj du gravaj sufiksoj. Unusence ĝi estas ero de didaktika gramatiko, sed ne plene. Ne estus rekomendinde prezenti ĉion skizitan al lernantoj (krom geniuloj!) en unu fojo. Prefere instruu unue la diversajn bazajn kazojn de IG, poste la kazojn de IĜ, kaj multe pli poste la uzon de IG kun transitivaj verboj (vico 4, dekstra kolumno), ĉar tio estas pli avancita temo. Nur fine, konsilindas doni la tutan superrigardon. Sed la instruisto bezonas la superrigardon antaŭ ol komenci!

## Kiel funkcias -IG-kaj -IĜ-? Ni saĝigos vin... kaj vi saĝigos

### -IĜ- indikas rezulton.

Ni uzas ĝin kiam ni interesiĝas pri la rezulto de ago. Estas tri ĉefaj kazoj:

- Priskribi la rezulton de natura procezo: la vento fortiĝas.
- Priskribi ion kun nekonata faranto/kaŭzanto: La rokoj leviĝis.
- Priskribi ion kiam pli gravas al ni la rezulto de ago ol ĝia faranto aŭ kaŭzinto: Feliĉe la televidilo ripariĝis, do ni povis rigardi la matĉon.



### -IG- indikas kaŭzon.


Ni uzas ĝin por indiki faranton aŭ kaŭzanton aŭ kaŭzon de ago.

Kiam ni uzas -IG- ni kreas verbon (transitivan) kun unu plia ligo.



Kiam ni uzas -IĜ- kun transitiva verbo ni kreas novan verbon (netransitivan) kun unu ligo malpli.

Baza demando, kiam ni uzas -IG au IĜ kun radiko: Ĉu tiu radiko havas aktivan verban formon aŭ ne? Se jes, ni devas trakti ĝin kiel en vicoj **2, 3** aŭ **4**. Se ne, traktu ĝin kiel en vico **1**.

	Unu-liga verbo	BAZO	Du-liga verbo
<b>1</b>  La baza radiko: 1) ne estas verba 2) ne havas aktivan verbon.  Senco de IĜ: simila al EK-.	La boato grandiĝos	La boato devas esti granda.	005 blovas kaj grandigas ĝin.
	005 spioniĝis antaŭ kvin jaroj.	005 estas spiono.	Aventuremo spionigis lin. La estro Z spionigis lin.
	005 fortiĝas.	Nun, li estas forta. Li fortas.	Ekzercado fortigas lin.
	La servisto silentiĝas.	La hotela servisto silentas.	005 silentigas lin.
	La kamelo laciĝas. Ĝi ekestas laca.	La kamelo estas laca. La kamelo lacas.	La varmo kaj la pezo de 005 laciĝas la kamelon.
	La kamelo malrapidiĝas.	La kamelo estas tro malrapida. Ĝi tro malrapidas.	005 rapidigos ĝin.
	005 senpacienciĝas.	Li estas senpacienca. Li senpacienca.	La malrapida kamelo senpaciencigas lin.
	La mapo enĝibiĝas.	La mapo iras en la ĝibon. Do, ĝi enĝibas.	005 rapide enĝibigas la mapon, ĉar la gardisto revenas.
005 ĵus surkameliĝis.	Do, nun 005 surkamelas. Li estas sur la kamelo.	Z surkameligis lin per ordono. La helpanto fizike surkameligis lin.	
<b>2</b>  La baza radiko estas verbo, sed de korpa teno kaj moviĝo.  Senco de IĜ: simila al EK.	005 envenis kaj sidiĝis.	Nun, li sidas.	Z diris: "Sidiĝu, 005" Do, Z sidigis lin.
	Lina sidiĝas kaj ludas per pupo.	Lina sidas. La pupo sidas.	Lina sidigis la pupon.
	"Suben!" krias 005. La kamelo genuiĝas.	La kamelo genuas. 005 forglitas de ĝi.	005 genuigis la kamelon.
	005 stariĝis.	005 staras.	Z starigis lin, per ordono.
	La misio stariĝis.	Do, la misio staras (!)	Z starigis la mision.
	La gardistoj kaŭriĝis.	Nun, ili kaŭras senmove.	Pafado kaŭrigis ilin.
	005 ne povis kuŝiĝi.	En la dezerto, 005 ne kuŝis.	Li ne povis kuŝigi sin.



	Unu-liga	Du-liga	Tri-liga
<b>3</b>  Netransitiva verbo kun aktiva signifo.  ne uzu IĜ.	005 alvenis	Z alvenigas lin.	
	005 kuras	La krokodilo kurigas lin.	
	La kamelo haltas.	005 haltigas lin.	
	005 saltas suben.	La senespera situacio saltigas lin.	
	005 falas.	La ombrelo-paraŝuto faligas lin sekure.	
	Okazas katastrofo!	La kamelo krias 'Zamenhof' kaj okazigas la katastrofon.	
	Kvardek gardistoj aperas.	La alarmo aperigas ilin.	
<b>4</b>  Transitiva verbo kun aktiva signifo.  Senco de IĜ: simila al pasivo.	La fenestro rompiĝis. (Ĝi estas rompita)	La ŝtelisto rompis la fenestron.	La ĉefo diris: 'Rompu tiun fenestron!' La ĉefo rompigis la fenestron.
	La Unua Libro repreniĝos.	005 reprenos la Unuan Libron.	Z ordonas la 005: 'Reprenu la unuan Libron'. Li reprenigas la libron.
	005 certas, ke li ne kaptiĝos.	Ĉu la volapukistoj kaptos la spionon?	La volapuka ĉefo volas kaptigi la spinonon.
	La banano manĝiĝas. (Ĝi estas manĝata).	La kamelo manĝas la bananon.	005 manĝigas la kamelon per banano, <b>aŭ</b> 005 manĝigas bananon al la kamelo.
	La kamelo vidiĝas.	La gardisto vidas kamelon	005 vidigas la kamelon al la gardisto.
	Vorto diriĝos. Ve!	"Diru unu vorton" krias 005.	005 dirigas vorton.



### Interesaj radikoj:

**TRU-** Tio estas substantiva radiko, sed havas verbon 'TRUI' kiu estas aktiva. Ĝi ne signifas 'Esti truo' sed 'Fari truon'. Sekve ĝi apartenas al la kvara grupo, ne la dua. Do, en tradicia trajno bilet-kontrolisto truas la biletojn, kaj la biletoj truiĝas.

**LOK-** Simile, tio havas aktivan verbon, "LOKI" = "Meti en lokon". Do, mi lokas la pinglon sur la mapon.

**DIPLOM-** Verbo ekzistas: "Doni diplomon". Do, la instruisto diplomas la studentojn.

**INTERES-** estas verba radiko, ne adjektiva. Do, mi interesiĝas pri io kaj tio interesas min.

**SATIR-** ne havas verbon, do la verbo SATIRI povas signifi nur "Esti satiro", Mi ne rajtas satiri la prezidanton, mi devas satirigi lin. (Eble iam tiu evidente utila verbo ek-ekzistos).

**SCI-** Interesa kazo, car tiu verbo foje priskribas agon, foje staton. Sekve ekzistas du uzmanieroj.

Kiel aktiva verbo: Mi scias la novaĵon – La novaĵo sciiĝas. (= estas sciata)

Kiel stata verbo: Mi scias la novaĵon – Mi sciiĝis pri la novaĵo hieraŭ. (= eksciis).

**TIM-** Simila kazo, ĉar foje stato, foje ago: 005 timas. Li timas krokodilojn. La krokodiloj timigas lin. (li timiĝas = li ektimas ≠ li estas timata). Krome tiu kiu estigas la timon, ne estas la subjekto de la frazo. Jen kazo en kiu la "aganto" ne identas kun la "subjekto".